



# *Familia* **ESPERANTO**

*N-ro 47 – somero 2007*

## **PSI-ANOJ MUZIKAS KUNE (p. 3) ...**



## **KAJ POSTE VIZITAS UNU LA ALIAN (p. 7)**



## Vorto de la redaktoro

Jen somera numero de *Familia Esperanto*. Ĝi estis pretigita pli rapide ol la pasinta numero, parte pro tio ke mi reuzis komputilajn modelojn de la printempa numero, parte ĉar mi ricevis multajn manuskriptojn, kaj ne devis verki mem tiom multe. Iom mi ĉerpis el Denask-listo kaj iom plukis el Interreto, kelkfoje sen peti permeson de aŭtoro ĉar jam pasis memfiksita redakta limdato.

Mi tre dankas al ĉiuj aŭtoroj de artikoloj kaj raportoj, tradukintoj, kaj aliaj helpantoj kiuj ofte rapide kaj efike respondis al miaj deziroj. Ne ĉion mi sukcesis pritrakti por tiu ĉi numero. Inter alie kuŝas ĉe mi multaj interesaj respondoj al miaj demandoj pri nomigado de infanoj. Kudri legindan artikolon el tio postulas pli da tempo ol mi deziras nun pasigi antaŭ ekrano. Sed ĝi aperos en venonta numero, fine de oktobro 2007.

Antaŭa redaktorino de FE, Katja Steele, afable proponis sin por provlegi la bultenon kaj korekti erarojn antaŭ publikigo. Pro tempomanko ĉi-foje mi ne uzis ŝian kompetentecon. Mi antaŭe pardonpetas pro eventualaj lingvaj eraroj forgesitaj en la teksto.

Krome mi dankas tiujn, bedaŭrinde iom malmultnombrajn, kiuj gratulis pro FE46. Se vi ŝatas la novan formon de la bulteno de Rondo Familia, sciigu tion al mi. Via kontento estas mia plej bona – kaj sola – salajro. Mi neniom ricevas de UEA/Rondo Familia pro la laboro. Verdire mi ankaŭ nenion petis!

Kiel mi jam menciis en FE46, mi deziras per la ĉi bulteno ke Esperanto estu ponto inter familiaj tradicioj kaj kulturoj, ne nur ke temu pri estintaj kaj estontaj REF, PSI kaj infanaj kongresetoj de UK. Verku pri familia vivo, edukado de infanoj, multlingveco, ĝenerale pri tiuj temoj kiuj interesas vin kaj povus same interesi aliajn legantojn de ĉi bulteno.

Kaj ĉar Universala Kongreso de UEA ĉi-jare okazas en Japanio, mi esperas ke estos multaj kontribuoj el Azio por venonta numero. Al tiuj kiuj ĉeestos la kongreson, nepre ne maltrafu la kunvenon de Ronda Familia.

Bonan someron norde de ekvatoro, kaj bonan vintron al niaj argentinaj kaj aŭstraliaj legantoj!

**Claude ROUGET**

## Enhavo

### Pasintaj aranĝoj

23-a Printempa Semajno Internacia...	3
5-a Montara Kroatia Renkontiĝo ....	4

### Estontaj aranĝoj

REF kaj Infankongreso de EEU.....	5
SOMERE (Esperantoland) .....	6

### Por aŭ de infanoj

Rakonto de Larissa kaj Laura .....	7
La revo de la porketo To .....	8-10
Pri la libro <i>Ĉio fareblas</i> .....	10
Kiu havas la zebbron? (enigmo) .....	16

### Esperantaj familioj

Kvarlingva familio Berthelot-Ertl ...	12-13
---------------------------------------	-------

### Multlingveco

Infanoj distingas lingvojn vide .....	7
---------------------------------------	---

### Familia vivo/edukado

Kial gravas bonaj familiaj rilatoj?	11
Steiner-lernejo por handikapitoj....	14-15

### Diverse

Novnaskitoj en E-familioj .....	11
---------------------------------	----

#### **Familia Esperanto**

estas bulteno por kaj pri esperantlingvaj familioj.

**Aperas** trifoje jare: en februaro, junio kaj oktobro.

**Redaktofino** ĉi-numera: 2007.07.07

#### **Redaktoro**

Claude Rouget  
[rypev68-fe@yahoo.no](mailto:rypev68-fe@yahoo.no)

#### **Eldonanto**

Rondo Familia de UEA  
(A.Wandel, J.Lindstedt,  
B.Schumann, C.Rouget)  
[uea.org/rondo\\_familia/](http://uea.org/rondo_familia/)

#### **Abonkotizo**

- libervola pago de 10 € al UEA-konto *idoj-p*
- senpage elŝutebla el retejo de Rondo Familia

**Limdato** por kontribuoj al venonta numero: 2007.10.01

## 23-a Printempa Semajno Internacia

Printempa Semajno Internacia (PSI) fariĝis regula kaj bone konata renkontiĝo de Esperantaj familioj, kiu ĉiujare kolektas en Germanio ĉirkaŭ 150 partoprenantojn. La ĉi-jara PSI, okazinta en Bonn de la 2-a ĝis la 9-a de aprilo, estis jam la 23-a. Aliĝis 163 homoj el 22 landoj.

Antaŭ naŭ jaroj, ĝuste PSI estis por nia familio la unua renkontiĝo kun aliaj Esperantaj familioj, kaj nun ni decidis reveni. Ni ne elreviĝis. La oferto de distraj kaj kulturaj programeroj, kursoj kaj eks-

ekzercis junajn muzikistojn por diversaj programeroj; la germana profesia magiisto Christoph Frank, kiu krom sian propran magian vesperon preparis ankaŭ grandiozan cirkan vesperon, kun bela dekoracio kaj multaj junaj entuziasmaj prezentantoj; kaj ukraino Mikaelo Lineckij, kiu gvidis konversacian rondon por plenkreskuloj kaj preparis humurajn programerojn kun kelkaj gejunuloj.

Male ol en REF, oni en PSI tradicie ne postulas, ke ĉiuj partoprenantaj familianoj sciu Esperanton. Tamen la nombro de la denaskuloj en PSI-oj estas nuntempe relative granda, tiel ke ankaŭ la infanoj povas tie en Esperanto trovi novajn amikojn kaj reenkonti malnovajn. Porokazaj krokodilantaj grupetoj eble formiĝis inter tiuj infanoj, kies naciaj lingvoj estis pli multe reprezentataj inter la partoprenantaro (germana, nederlanda, franca), sed kiel finnoj, niaj tri infanoj havis la avantaĝon devi uzi Esperanton. Por la plej juna, 7-jara Sakari, ĉi tiu estis efektive la unua renkontiĝo, kie li vaste kaj memstare uzis la lingvon – kaj dum la libera tempo kaj kiel unu el la “cirkanoj”. Nia familio estis tre kontenta post la ĉi-jara PSI.

**Jouko LINDSTEDT**



kursoj, artaj vesperoj kaj koncertoj estis multflanka, kaj la amika etoso estis bonega. Kaj se oni ne volis partopreni iun programeron, ĉiam eblis pasigi la tempon babilante en la “knajpo”, la PSI-a trinkejo. Okazis ankaŭ la tradicia PSI-programero plej atendata de la infanoj: la paskmatena serĉado de ĉokoladaj ovooj kaŝitaj en arbareto.

Siatempe, la PSI-ojn longe organizis ĉefe la familioj Bohr, Fischer, Kruse kaj Loose, sed iom post iom okazis sukcesa generacio ŝanĝo. La ĉefaj organizantoj ĉi-jare estis la familioj Gersonde, Frense, Brücker-Sözüer, Buhr kaj Klünder, sed ankaŭ multaj aliaj grave kontribuis al la programo. Menciindas ekzemple norvegino Marianne Lund, kiu gvidis la Mazi-kurson por infanoj kaj lerte





## 5-a Familia Montkabana Renkontiĝo

Inter la 11-a kaj la 13-a de majo en montkabano *Andrejev dom na Slemenu* (norda Slovenio) okazis 5-a Familia MKR ([www.keja.hr/mkr.html](http://www.keja.hr/mkr.html)). Ĉi jare la aranĝon partoprenis 18 partoprenantoj (el ili 8 infanoj) el 6 familioj el Hungario, Kroatio kaj Slovenio.

Kiel kutime, la celo de tiu jam tradicia aranĝo estis pasigi agrablan tempon en naturo en bonhumora E-etoso. Denove renkontiĝis malnovaj amikoj, kaj plenkreskaj kaj junaj (bedaŭrinde, neniu nova familio partoprenis la aranĝon ĉi jare), denove ni ludis diversajn ludojn kaj ankaŭ ĉi foje ne mankis migrado tra bela arbara ĉirkaŭaĵo de la MKR-ejo. Plej ŝatataj ludoj ĉi jare estis ludoj kun eta ligna ludtrajno. Ĝiaj reloj okupis du tutajn tablojn en la manĝejo. Ankaŭ la ekskurso per kiu finiĝis la aranĝo – vizito al fermita minejo ĉe Mezica – rilatis al trajnoj, ĉar partoprenantoj vizitis la aron da subteraj tuneloj per malgranda minista trajno. Veturado per ĝi estis neforgesebla sperto! La vizitantoj povis vidi la ilojn kiujn ministoj uzis inter mezepoko kaj nuntempo kaj aŭskulti interesajn rakontojn de la gvidisto kiu mem laboris en la minejo dum 30 jaroj.



Do, la celo de la aranĝo estis plenumita, kaj infanoj kaj gepatroj amuziĝis kaj ripozis kaj tio donis al ĉiuj eblecon fari etan E-

paŭzon dum printempa sezono. Spite al tio, evidentiĝas ke nur malmultaj familioj partoprenas la aranĝon – kvankam E-familioj en Kroatio kaj najbaraj landoj ne multnombras, tamen pluraj pliaj loĝas en tiu ĉi regiono, sed pro diversaj kialoj ne eblas aŭ



ne emas veni. Aldonaj problemoj estas la distancoj – ne estas ĉiam agrable vojaĝi dum pluraj horoj por partopreni nur dutagan aranĝon – kaj taŭgaj ejoj. Ne multaj ejoj estas taŭgaj por tiuspeca aranĝo, precipe se oni zorgu ke la kostoj estu pageblaj por plej multaj. Sed, ankaŭ ĉi jare evidentiĝis ke, spite al antaŭjuĝoj de kabanestroj, pluraj infanoj povas loĝi kaj amuziĝi kune sen ajna problemo.

Bona afero kiu rilatas al Familia MKR estas ke la aranĝo iĝas pli kaj pli konata. Pluraj ekstermezeŭropaj familioj scias pri ĝi kaj jam kelkaj provis plani la alvenon, foje aperas artikoloj kaj informoj pri ĝi en E-medioj kaj ni esperas ke en estonteco ĝi havos pli da partoprenantoj el pli da landoj.

**Vanja RADOVANOVIĆ**

## 29-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj

Al ĉiuj familioj, kiuj hejme uzas Esperanton

Ni kore invitas vin al la 29-a REF. En 2007, ĝi okazos de dimanĉo, la 22-a de julio, ĝis sabato, la 4-a de aŭgusto, en la feriejo Tiszafüredi Ifjúsági Tábor en la montaro Bük, pitoreska regiono 160 km oriente de Budapeŝto. La unua manĝo estos la dimanĉa vespermanĝo, lasta manĝo estos manĝopakaĵo por tagmanĝo. La loko apartenas al la proksima vilaĝo Nagyvisnyó [*Noĝviŝnjo*].

Ni loĝos en lignaj domoj, kiuj situas en bela valo sur dekliva tereno, unuflanke kun barilo, la alian flankon baras rivereto. Ĉiuj domoj havas tri ĉambrojn kun po kvin litoj.



Al la domoj apartenas propra necesejo kun malvarmakva lavkuvo. La komunaj duŝejoj troviĝas en la “malsupra” parto ene de cent

metroj. Memserva manĝejo kun bufedo situas “supre”. En la bufedo ĉiam haveblas kafo, sen- kaj kunalkoholaj trinkaĵoj, glaci-kremoj je modestaj prezoj.

Ni atendas ĉ. 20 familiojn, kies infanoj almenaŭ komprenas Esperanton. La programo dependas de la kontribuoj de la partoprenantoj mem: Komuna kantado, manlaboro, desegnado, sportludoj, muzikado, lingvaj ludoj, fabel-legado kaj -verkado, naĝado, migrado ktp. Ni planas fari du tuttagajn ekskursojn: al Szilvásvár, kie ni vizitos naturan parkon kun belegaj akvofaloj (10 km) kaj Eger kun malnova fortikaĵo (30 km).

Krom feriado, la ĉefa celo de la aranĝo estas aktivigi la esperantan lingvokapablon de la infanoj. **Se vi deziras ke viaj infanoj eklernu Esperanton, tiam REF ne taŭgas por vi; ekzistas diversaj aliaj aranĝoj por tiu celo.** Cetere estas bonvenaj ankaŭ partoprenantoj sen infanoj, ekzemple paroj kiuj planas eduki ontajn infanojn en Esperanto.

Pliaj informoj haveblas ĉe jena retadreso: <http://familioj.komputilo.org/REF/2007/>

## Infana Kongreseto de la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

Paralela programo de EEU-kongreso en Maribor, Slovenio (28.07–4.08.2007) estos ankaŭ la Eta kongreso. Ĝi okazos en proksima infana ripozejo Areh sur montaro Pohorje. Areh situas 25 km de Maribor, 1246 metrojn super maro. La klimato estas modera alpa kaj ĝi bone influas kontraŭ diversaj malsanoj de spirvojoj kaj pulmoj. Ĝi helpas ĉe diversaj alergioj kaj nervostreĉo.

Infanoj loĝos en “Ĉandrova koĉa”, kie oni kutime organizas “lernejon en la naturo” por lernantoj, somerripozojn kaj skiferiojn por infanoj. Ĉirkaŭ la ripozejo kreskas arbaro de abioj kaj piceoj, kaj inter ili troveblas montaj herbejoj. Apud la ripozejo estas infanludejo kun diversaj ludiloj. Tuj apude estas ankaŭ granda herbejo kie oni povas ludi grupajn ludojn. Ĉirkaŭaĵo donas multajn eblecojn por promeni kaj observi

birdojn, florojn, fungojn kaj kolekti sovaĝajn fruktojn (mirteloj, framboj...). Infanoj havos eblecon provi rajdi ĉevalojn.

Ĉambroj estas kvinlitaj kaj ĉiu ĉambro havas propran enirejon kun ŝrankoj, duŝejon kun necesejo kaj balkonon. Littukoj estas je dispono. Bonvolu preni nur proprajn viŝtukojn. Ankaŭ personaj libroj, muzikinstrumentoj kaj negrandaj ludiloj estas bonvenaj. Ni preparos pilkojn (kaj aliajn flugantajn ludilojn), sociajn ludojn kaj materialojn por desegnado, modelado...

La infanoj nepre devas havi ordigitan akcidentan kaj sanasekuron, validanta en la ŝtatoj de EU. Se vi bezonas vizon kaj invitleteron rigardu la kondiĉojn ĉe “kondiĉoj por vizoj”.

Pliaj informoj ĉe: [http://www.esperanto-maribor.si/programo\\_de\\_kongreseto.html](http://www.esperanto-maribor.si/programo_de_kongreseto.html)

## 5-a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo de Esperantoland

Ĉu vi ŝatas someron? Pasigi tagojn ekstere, babili, kafumi en agrabla rondo, eble de tempo al tempo ludi, promeni aŭ aŭskulti prelegon – ĉu logas vin revii pri tio? Kaj fari tion en internacia rondo de Esperanto-parolantoj, ĉu bela ideo? Se jes, eble konsideru somerumi kun ni en la 5-a SOMERE, Somera Mezeŭropa Renkontiĝo de EsperantoLand, de la 13-a de julio ĝis la 28-a de julio 2007 (vendredo ĝis sabato) meze de la arbaro apud Jünkerath en la mezmontaro Eifel, ĉ. 80 km sude de Kolonjo en Germanio.



### Loĝu en domo aŭ tendo, partoprenu la manĝojn aŭ mem kuiru!

Kiel kutime dum SOMERE vi povas mem elekti vian nivelon de lukso: ĉu vi ŝatas tranokti en domo – aŭ prefere en via tendo aŭ loĝaŭtomobilo? Ĉu vi deziras partopreni la komunajn manĝojn de la domo aŭ mem prepari ilin? Pri tio vi povas mem decidi.

### Tempodaŭro laŭ via deziro

Ankaŭ rilate la tempodaŭron vi povas elekti laŭ via plaĉo. Ĉu vi volas pasigi nur semajnfinojn aŭ ĝui dusemajnan ripozon? Ni ĉiukaze antaŭĝojos pri via partopreno.

### Lerni Esperanton kaj tuj apliki ĝin

La internacia renkontiĝo SOMERE estas aparte taŭga por komencantoj kaj progresantoj. Vi povos lerni la lingvon dum la lecionoj kaj poste tuj apliki ĝin en leĝera atmosfero. Egale, ĉu vi volas eklerni Esperanton, ĉu vi jam partoprenis unuan kurson kaj volas progresi aŭ ĉu vi jam parolas dum iom da tempo kaj deziras pliperfektigi – ni volonte subtenos same vian lernadon kiel ankaŭ vian ĝuan partoprenon en la renkontiĝo.

### Programo en- kaj eksterdome

Ni faros promenojn kaj ekskursojn al najbaraj vilaĝoj kaj urboj, ni babilos kafumante (aŭ teumante) en la ĝardeno kaj vi povos aŭskulti kelkajn prelegojn kaj partopreni en kursoj. La programa oferto enhavas interalie: primaj nombroj – de Eŭklido ĝis hodiaŭ, komunikado sen perforto, ekzercado pri komunikado, la orgenkomponisto Dietrich Buxtehude kaj lia influo (orgenkoncerto), danca ateliero, cirklodancoj, Qi Gong, olimpikoj (en la granda ludsalono), kurso pri go-ludo, diversaj bret- kaj aliaj ludoj. Eble geokaŝado (serĉado de kaŝitaj objektoj eksterdome) Ankaŭ okazos konversacia rondo, demandoj pri gramatiko kaj plia Esperanto-kurso laŭ bezono. Pliajn programerojn ni volonte enmetos laŭ via propono.

Se vi deziras pli detalajn informojn, rigardu retpaĝon <http://esperantoland.org/somere>. Volonte ni respondos viajn demandojn.

Estu bonvena SOMERumi kun ni!

**Lu WUNSCH-ROLSHOVEN**

## 38-a Internacia Infana Kongreso en Japanio

En numero 46 de *Familia Esperanto* aperis prezenta artikolo pri tiu evento ligita al UK (4-a ĝis 11-a de aŭgusto 2007). Ĉu vi deziras scii kiuj infanoj jam aliĝis, aŭ kiu prizorgos la geknabojn? La nomojn, fotojn kaj prezentojn vi trovos en la retejo de Bert

Schumann, la respondeculo pri IIK 2007: <http://bertosch.free.fr/iik2007/alighintoj.html>. Dume aliĝis 6 knaboj kaj 7 knabinoj inter 8 kaj 16 jaroj. Kvar plenkreskuloj el Francio, Germanio kaj Japanio okupiĝos pri kaj kun ili.



## Infanoj distingas lingvojn vide

Laŭ unupaĝa artikolo aperinta en la scienca revuo *Science (Visual Language Discrimination in Infancy* de Weikum kaj aliaj, 2007-05-25), infanoj aĝantaj nur 4 monatojn jam kapablas distingi inter sia gepatra lingvo kaj alia lingvo, spektante filmon de parolanta vizaĝo sen sono, sed ĉe 8 monatoj la unulingvaj infanoj jam perdis tiun kapablon, dum la dulingvaj infanoj retenas ĝin. Jam estis konate, ke plenkreskuloj povas distingi lingvojn vide, kaj ke junaj infanoj povas distingi ilin aŭde. Novaĵo estas tamen, ke infanoj povas distingi lingvojn vide.

En la eksperimentoj oni studis unulingvajn anglalingvajn infanojn kaj dulingvajn angla- kaj franc-lingvajn infanojn ĉe 4, 6 kaj 8 monatoj. Oni montris al la infanoj silentajn filmetojn de dulingvaj parolantoj dirantaj serion da frazoj en la du lingvoj, kaj oni mezuris, dum kiom da tempo la infanoj rigardis la ekranon. Ĉar la infanoj tendencis pli rigardi la ekranon, kiam ili rimarkis, ke la parolanto ŝanĝis la lingvon, oni povis per statistika analizo ekscii, kia-grade tiu kapablo troviĝis en la diversaj grupoj.

La rezulto estis, ke 4- kaj 6-monataj infanoj povas distingi la lingvojn, sed ĉe 8 monatoj nur la dulingvaj infanoj povas tion fari. Ŝajne la klarigo estas, ke la unulingvaj infanoj ne bezonas la kapablon, do ili perdas ĝin. Tiu perdo de percepta kapablo ne estas tre surpriza, ĉar oni trovis similan perdon de percepta kapablo en aliaj kampoj. Ekzemple, dum sia unua vivjaro infanoj perdas la kapablon distingi fremdajn parolantojn kaj la vizaĝojn de bestoj – dum ili retenas, evidente, sian kapablon distingi la parolantojn de siaj gepatraj lingvoj kaj la vizaĝojn de homoj. Ke la dulingvaj infanoj retenas la kapablon vide distingi lingvojn, eble indikas, ke tiu kapablo estas iel utila, do la vida aspekto de parola lingvo estas pli grava, ol oni eble pensus.

Gepatroj de denaskaj esperantistoj verŝajne jam konscias pri la edukaj avantaĝoj de plurlingveco. Ĉar ĉi tiu studo montras, ke plurlingvaj infanoj retenas perceptan kapablon, kiun unulingvaj infanoj perdas, eblas rigardi ĝin kiel ankoraŭ unu pruvon pri tiuj avantaĝoj.

**Edmund GRIMLEY EVANS**

## Ital-finna junamikeco per Esperanto

Ni estas du amikinoj, Laura kaj Larissa. Laura venas de Italujo kaj Larissa de Finnlando, kaj ni ambaŭ estas denaskulinoj. Ni renkontiĝis en PSI 1998 kiam ni estis 3-jaraj. Ekde tiam ni sendis leterojn unu al alia. Nun ni estas preskaŭ 13-jaraj kaj la lastan fojon ni renkontiĝis en PSI en aprilo 2007 en Bonn (Germanujo). Nun somere Larissa venis al Romo kaj ŝi loĝas dum 9 tagoj en la hejmo de Laura. Ni vizitas Romon kune kaj ni ankaŭ iris al la maro apud Romo (San Felice Ĉirĉeo). Ni volas rakonti kiel ni pasigis ĉi-tiujn tagojn.

### 25.6.2007

Vespere alvenis la aviadilo de Larissa. Laura kaj ŝia familio iris preni ŝin. Antaŭ ol enlitiĝi ni kaj la patro de Laura ludis *Monopoli*.

### 26.6.2007

Post la tagmanĝo venis al la hejmo du amikinoj de Laura kaj, kiam ili foriris, ni iris (kun Mauro kaj Margerita, la gepatroj de

Laura) viziti la centron de Romo. Antaŭe ni paŝis en la malnova parto kaj poste al Kampidoglio (en esp. Kapitolio), via Dei Fori Imperiali kaj Vittoriano. Poste ni alvenis en Placo Venecia kaj fine al Fontano de Trevi (kie ni faris ĉi tiun foton).



De maldekstre: Larissa kaj Laura

Daŭrigon de la rakonto, verkita de la knabinoj mem, vi povas trovi en reto ĉe: <http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/lauxra/larilaur.pdf>

## La revo de la porketo To

de **Luís LADEIRA**

Jen To, aminda porketo, ĉiame revemulo. Tamen, ne nur revemulo. Krom tio, li ankaŭ estis diligenta kaj pro tio realigema pri ĉio, kiun li prirevis. Kaj pri kio revis la revema porketo? Nu... li ege volis flugi kaj gliti en aero, same kiel mevoj!

Do, pensante sin kiel mevo, la porketo To forte ekskuis la brakojn por flugi, tamen... nenio okazis. Eĉ centimetron li ne moviĝis for de la loko sur kiu li estis. Ho ve! Ne, ne pensu pri rezigno. Volemulo ne facile rezignas. Precipe se li ankaŭ estas ruzulo kaj kuraĝulo, kiel li estis. Do, la porketo To grimpis sur muron, kuris laŭlonge de ĝi kaj skuante forte la brakojn sin ĵetis en la aeron... PUM! Ho, li falis sur la grundon, kiel ŝtono! Ja, la porketo To estis tiel kuraĝema, kiel senzorgema! Skrapvundetojn sur siaj kuroj kaj brakoj li neniel povis eviti. Paciencon! Tio ne sufiĉis por ke li ploretu aŭ rezignu el siaj planoj. Ne! Li estis persistema! Leviĝis, frotremis siajn kurojn kaj brakojn kaj regrimpis sur la muron. Pli da rapideco, pli da elano... tamen lia korpo tro pezis. PUM! Jen li denove ŝtone sur la grundon. Nu, tio vere dolorigis! Sed eĉ ne unu okulfrapan larmon viŝis nia Toeto. Tamen li komprenis fine ke tiele flugi ne eblas kaj, frotante sian nazpinton, li rezignis al tiaj eksperimentoj. Pli bone estus konsiliĝi kun la pork-baptopatrino. Certe ŝi instruos al li flugadon, same kiel antaŭe ŝi instruis al li naĝadon. Nepre! Tien kuris Toeto.



Alvenis la porketo al baptopatrino domo iomete ĉagrenite, kaj tio tuj zorgigis la prizorgantan pork-baptopatrinon:

— Kio okazis kun vi, mia Toeto? Vi ŝajnas tiom stranga! Ho!... vi estas tute skrapvundita!

— Ne, ne tute! Mi spertis flugadon, jen estas ĉio! — la eta To klopodis mildigi la etoson.

— Flugadon?! Sed vi neniel povas flugi, vi ja ne havasflugilojn!... — forte miris la pork-baptopatrino, kaj por pruvi la malsamecon montris per fingro la milvon, kiu ŝvebis super la kokinejo.

Nur tiam la porketo To klare ekvidis tion, ke liaj brakoj neniel similas alflugiloj de birdoj. Eĉ plumojn ili ne havas! Pro tio li ege malĝojis, kaj nek la bombono donacita de la baptopatrino povis dolĉigi lian buŝon.

Revenante hejmen, kapklininte, li preskaŭ ne rimarkis Zeĉjon Azenon, kiu portis sur la dorso ŝarĝpreme du pezajn sakegojn da maizo.

— Hej To, kie estas via kapo? Ĉu en la nuboj?

— Ha?!... Ha! Tion mi volus — diris Toeto sin pensante ĉiam kiel aerulo — sed malfeliĉeflugilojn mi ne havas! — bedaŭris li.

— Flugilojn? Por kio volas viflugilojn? — demandis tre intrigite Zeĉjo Azeno.

— Por kio?!... Ĉu vi ne ŝatus flugi?

— Mi?! Ĉu vi imagas minfluganta en aero kun tiuj ĉi sakegoj? Tiel malfacile jam estas porti ilin per kvar piedoj!... — kaj Zeĉjo antaŭen iris ridetante pri la stranga revo de la etulo. Siaflanke la ankoraŭ pli malĝoja Toeto daŭrigis sian vojon.

Alveninte hejme, pripensante ankoraŭ la malĝojan sorton naskiĝi senflugiloj, la porketo To rigardis tra la fenestro la kampojn kaj maron, kaj bedaŭris ne esti birdo, birdego aŭ birdeto, mevo aŭ kardelo aŭ io ajnflugkapabla. Li sin imagis al si memsvingiĝantan super la domo, sidantan sur la plej alta pinto de la lumturo, kajflugkurantan kun la hirundoj. Tiuj hirundoj, kiuj tiel rapidege preterflugis lian fenestron, dum la mevoj, paciencokaj trankvile, sidiĝis sur la tegmentoj reprenante siajnflugilojn por ripozi. Kiom belaj estis tiuj paseroj, kiuj forflugis al la kampo! Tamen tiumomente io forigis la feliĉan senton el la koro de la revema Toeto. Ĉu la mevoj, ĉu la hirundoj, ĉu la kardeloj, ĉu la paseroj, ĉiuj, sendube, ĉiuj havasflugilojn! Eĉ la bela papilio, kiu



ĵus sidiĝis sur la rozujo en la ĝardeno! Eĉ la muŝo, kiu sidiĝis sur la nazo de la eta To!! Ne, sen flugiloj oni ne povas flugi! Ho ve!...

Ĉu vere? Sen flugiloj oni ne povas flugi, ĉu? Do, kio estas tio, fluganta super la arbo? Ĉu balono? Jes, ĝi estas balono! Kaj ĝi ne havas flugilojn... tamen ĝi flugas!...

Nekredeble! La porketo To jam kuras ekscitita laŭ la strato al baptopatrino domo. Preskaŭ senspire li frapas la pordon kaj veninte al sia zorgema baptopatrino, li krias: — Mi vidis!... Mi vidis!...

— Kion vi vidis, Toeto? Trankviliĝu, fileto! Kio okazis al vi?

— Mi vidis balonon flugi en aero... Kaj ĝi ne havis flugilojn! — finfine li sukcesis elparoli kelkajn vortojn, kvankam ankoraŭ spirante kaj tremante.

— Ho, do estas tio! Estas tio, kio ekscitas vin — diris la pork-baptopatrino kapjesante. — Certe tio estas gasbalono.

— Gasbalono?! Balono plenigita de gaso?...

La porketo To preskaŭ tuj imagis la solvon de la problemo. Rimarkeble ekbrilis liaj okuloj. Tamen, divenante lian penson la baptopatrino interrompis lian fantaziaĵon:

— Ne, ne pensu! Ne pensu tion! La gaso estas tre danĝera. La gaso mortigas!

Tion ne atendis Toeto. Ĉu li ne povus pleniĝi sian bruston per gaso, same kiel nun pleniĝas ĝin la aero? Se pro gaso balonoj flugas, kial li ne povus surmeti sian buŝon sur la kuireja gasbotelo kaj pleniĝi sin, same kiel la balonoj?

— M ... m... - pro sia elreviĝo la eta To eĉ unu vorton ne sukcesis diri. La pork-baptopatrino, tralegante la ĉagrenon kaj la ribelon sur lia vizaĝo, penis por kompreni lin, kiom danĝera estus tiu ĉi afero.

— Atentu, fileto, vi ne estas balono. Vi havas pulmojn, sangon kaj multajn aliajn internan organojn, kiuj funkcias danke al oksigeno de la aero, sed ne per gaso de kuirilo. Oni ne povas ĉion spiri, same kiel oni ne povas manĝi ĉion. Multaj aĵoj kiuj ĉiutage estas utilaj, mortigus nin se ni englutus ilin. Ĉu vi bone komprenas?

La porketo To kapjesis, forte enspiris, dankeme kisis sian baptopatrino kaj ek al la hejmo por ludi kun siaj pupoj kaj ĉaretoj. Tamen, kia bedaŭro ne povi enspiri gason!!! Atendu iomete. Kio estas tio multkolora tie, blua, flava, blanka, kiu svingiĝas je longaj fadenoj?! Kunpremiĝis la koro de nia porketo. Li alproksimiĝis kaj konfirmiĝis pri tio, kion li suspektis. BALONOJ! Amaso da

balonoj, multkoloraj, plenaj, rondaj, streĉitaj balonoj, pretaj por flugi.



Ĉu iu ajn divenis tion, kio trapasis la kapeton de nia porketo? Precize! Li alvokis la balonvendiston kaj aĉetis ĉiujn balonojn.

— Por kia celo vi volas aĉeti ĉiujn balonojn? mirigite demandis la vendisto.

— Vi ekvidos tuj. Helpu min, bonvole.

La porketo To, kun la helpo de balonisto, rapide alligis ĉiujn balonojn al sia korpo, al piedoj, kapo, brusto kaj brakoj. La emocio silentigis lin. Sed kiam la lasta balono estis alligita al lia zono kaj li fine komencis elteriĝi, li gaje eksplodis:

— Vidu! Vidu! Vidu! Mi flugkapblas. Mi flugas, mi flugas...

La porketo To malrapide suprenleviĝadis, rigardata kun mirego de la balonvendisto, kiu malsupre daŭre manfrapadis kaj konstante malpligrandiĝadis. Toeto elorbitigis siajn okulojn antaŭ la mirindaj vidaĵoj. La arboj kaj la domoj, kiuj al li ŝajnis antaŭe grandegaj nun fariĝas tiom etaj, preskaŭ pli malgrandaj ol li.

Ho, tie iras Zeĉjo Azeno. “He, Zeĉjo, Zeĉjo Azeno, estas mi supre, la porketo To, ĉi tie, supre!” Tamen, Zeĉjo Azeno ne kredis pri tiu To-voĉo, falanta el ĉielo, kaj rapide daŭrigis sian piedradon sen levi la kapon. Leviĝis la ŝultroj de Toeto. Nun ankaŭ la vilaĝo malpligrandiĝas kaj li pli kaj pli streĉas la okulojn al ĉio, troviĝanta trans la tegmentoj de la domaro. Liaj okuloj verdiĝis pro verdaj kampoj, bruniĝis pro ruĝbrunaj koloroj de la tero kaj pleniĝis de verdblua maro. La surprizitaj mevoj, kiuj neniam vidis tian birdon, rondire kaj senhalte moviĝadis. La eta To mansignis al ili, grimacis, laŭte ridegis kaj alvokis ilin, sed singarde, en distanco, ili sin tenis.

Ĉio similis al bela sonĝo el kiu Toeto ne volis eliĝi. Kaj ĉiam suprenirante. Nun eĉ la balonvendiston li ne vidas. Iom post iom ĉio malpligrandiĝadis kaj subite kelkaj malaperis. Tiu ĉi situacio iom maltrankviligis nian heroon. Ĉu li sukcesis reveni al la tero? Tamen rapide li forgesis pri sia maltrankvilo, ĉar la vidaĵo sur la inversigita mondo estis treege bela por ke oni atentigu pri problemetoj. Resti tie, en tiu ĉi aernaĝejo, estis lia ununura deziro.

Tamen, ŝajnas ke la grundo alproksimiĝas. Estas jam videbla la hejmo de To. Estas denove distingebla la balonvendisto. Kio okazas?!... Precize tio, ke la balonoj perdas gason. Kaj laŭ la mezuro en kiu tio okazas Toeto desupras el la alteco. Jam li superflugas sian straton. Daŭre desuprante li estas jam antaŭ la fenestro de sia ĉambro.

— He, Matino! — kriis Toeto al la felpa urso kuŝanta sur lia litkapo.

Dume, venteto puŝas lin en la ĉambron, ĵus kiam la lastaj balonoj perdis sian gason. Milde, la feliĉa Toeto allitiĝis.

Silentu! Ne bruu! La porketo To tiu, kiu ege volis flugi, ĵus revenis el sia impresplena flugvojaĝo, pri kiu li iam aŭdacis nur revii. Lasu lin ripozi. Certe li sonĝos pri diverskoloraj balonoj. Balonoj laŭ bekoj de mevoj kaj flugiloj de papilioj. Hirundbalonoj! Kadekbalonoj! Milvbalonoj! Eĉ najtingalbalonoj!

Bonan nokton, Toeto. Dormu bone!

## Libro kaj sonbendo *Ĉio fareblas*


Nia familio parolis nur france ĝis 2005 kiam ni decidis ebligi dulingvecon en nia hejmo. Komence mi parolis esperante al Annaïs kaj Maureen, niaj plej grandaj filinoj, kaj rediris la frazon en la franca. Ni do ĉiam bezonas trovi bonkvalitajn kaj interesajn librojn, filmojn ktp por la infanoj.

Dum la fino de la lasta jaro, niaj infanoj ricevis tre belan libron, *Ĉio fareblas* kaj ni konsciigis ke la dua filino ne povas ĝui ĝin, ĉar ŝi ne ankoraŭ scipovas legi. Ni decidis fari aŭskulteblan version de la libro, por ke infanoj kaj komencantoj sekvu la rakonton per la bildoj, aŭdante la tekston. Ni surbendigis 6 voĉojn.

Annaïs Hurstel:	<i>Zoe</i>
Bénédicte Hurstel:	<i>Artemiz</i>
Violette Walther:	<i>la patrino</i>
Bruno Flochon:	<i>la patro</i>
Vincent Feydel:	<i>Marteno</i>
Cyrille Hurstel...	<i>por la cetero</i>

Ni interkonsentis kun la eldonisto per kontrakto, kaj nun vi povas libere elŝuti la sondosierojn pere de la familia retejo <http://benecyril.free.fr>. Libere uzu kaj disvastigu tiun sonbendon kondiĉe ke vi respektu la licencon *Creative Commons* (kreaĵo komuna), dua versio kun la pecoj

“kreantoj”, “nekomerca uzo” kaj “neniu ŝanĝo”. Ĉiuj eroj devas ariĝi.



Tiu libro membriĝas en kolekto de pluraj libroj en la Franca lingvo. Aŭtoro-ilustristo, Aline de Pétigny verkas por la infanoj de pli ol dek kvin jaroj. Pere de la serio *Historioj por pensi ĝustasence*, ŝi celas komuniki ian filozofion pri la vivo, kaj por etuloj kaj por plenkreskuloj.

Ni esperu ke la libro bone disvastiĝos, por ke la eldonisto kaj la tradukistoj, Christian kaj Martine Rivière, decidu esperantigi aliajn librojn. La libro aĉeteblas ĉe ambaŭ. Vidu <http://pourpenser.com> kaj serĉu “fareblas” per la serĉilo. Bonan legadon kaj aŭskultadon!

**Cyrille HURSTEL**

## Kial gravas bonaj familiaj rilatoj ?

Kiel multaj socie vivantaj mamuloj kaj birdoj, ankaŭ homidoj naskiĝas kun forta ligiĝinstinkto: ili serĉas iun, de kiu ili povas lerni kiel funkcias la vivo sur tiu ĉi planedo. En sia unuatempa dependeco kiel suĉulo, homido vekas per sia rideto kaj sia grandokula alrigardo ankaŭ nian ligiĝinstinkton: ni plialtigas nian voĉtonon, ni pli malfermas niajn okulojn, kapjesas kaj donas nian fingron al la infano. La suĉinfano ligiĝas al ni, ekzemple prenante nian fingron en sian manon aŭ pli poste streĉante siajn brakojn responde al niaj alstreĉitaj brakoj, lasante sin levi.

Ĉiuj ĉi estas instinktaj reagoj kiuj sekurigas nian pluvivon de centmiloj da jaroj. Kiam mankas patrino aŭ patro, pli aĝaj gefratoj kaj aliaj parencoj la infano aplikas sian ligiĝinstinkton alidirekten – kiel la ĵus eloviĝinta anasido, kiu, se mankas panjo, fide postkuras la farmiston, la hundon aŭ ludaŭton. Ankaŭ homidoj ne diferencigas ĉu la objekto de ilia ligiĝo taŭgas al la prizorgado de sia evoluo. Dum la lastaj 50-60 jaroj nia vivmaniero tiel ŝanĝiĝis ke ĝi ofte havas malbonan influon al nia praa ligiĝinstinkto.

Kompreneble ankaŭ hodiaŭ infanoj ĝenerale ligiĝas al la plenkreskuloj kiuj prizorgas ilin. Tamen ili falas en truon, nome kiam ili estas disigitaj de iliaj fidataj rilatuloj kaj ili restas solaj en granda grupo de samaĝuloj. En infanvartejoj kaj lernejoj estas plej ofte hazardo ĉu infano ligiĝas al la prizorganta plenkreskulo. Se tio ĉi ne okazas, la infano restas en ĝena liga kaj orientiĝa malpleno. Pro neceso li/ŝi orientas sian ligiĝinstinkton al la aliaj, same “konfuzitaj” infanoj. Ekde nun li/ŝi ne plu tiom forte konsideras siajn gepatrojn sed siajn samaĝulojn. Kion tiuj ĉi postulas, fariĝas la gvidilo de liaj/ŝiaj faroj kaj plej grava fariĝas la propra sukceso antaŭ samaĝuloj.

Tamen infanoj povas esti tre kruelaj. Se infano ligiĝas ne plu al siaj gepatroj sed al samaĝuloj, tiuj ĉi kruelaĵoj doloras neelteneble. Infanoj protektas sin tiukaze per dika karapaco ĉirkaŭ ilia koro kaj adaptiĝante por ne esti ekskludata. La rezulto estas sensentaj infanoj kiuj interesiĝas nur pri tio kio modas en siaj samaĝulaj grupoj. Samtempe la gepatroj ne plu sukcesas atingi siajn infanojn, kiuj surdas je iliaj petoj kaj konsiloj.

Kiel la anasido, ankaŭ la samaĝulema infano ne rimarkas ke li/ŝi sekvas maltaŭgan orientiĝilon kaj sentas sin sekura dum la objektoj de lia/ŝia ligiĝo proksimas. La senespera strebado al grupaparteno lasas neniom da spaco por la evoluigo de la propra personeco kaj nur etan spacon por lernado.

Kion povas fari la gepatroj por ke tio ĉi ne okazu? La respondo estas evidenta: zorgu pri harmonia familia vivo, pri bona rilato, por ke viaj infanoj ne falu en la ligan truon. Se via infano regule vizitas vartejon aŭ lernejon – kontaktu *antaŭe* la prizorgantojn kaj instruistojn. Zorgu pri tio ke tiuj ĉi ekhavu veran rilaton kun via infano kaj klarigu kial tio gravas al vi. Tenu kontakton kun la gepatroj de la amikoj de viaj infanoj, invitu ilin kune, kreu rilatan reton! Se viaj infanoj jam forte orientiĝas al samaĝuloj, regajnu ilian koron. Infanoj povas evoluigi veran plenkreskulan maturecon nur protektataj de sekuraj, fidindaj rilatoj kaj ekzemploj.

**Dagmar NEUBRONNER**  
(esperantigis **Eva FORMAGGIO**)

Konsilata libro: Gordon Neugeld/Gabor Maté, *Hold on to your kids*. Tradukita al franca, germana, portugala, hebrea lingvoj kaj baldaŭ ankaŭ en la hispana kaj korea.

## Novnaskitoj

Mi ĝoje kaj fiere informas, ke 23-a de majo al ni naskiĝis filineto: 3 kg 170 g, 52 cm. Kvankam ni decidis nomi ŝin **Ksenia** (greke “fremda”), mi strebos, ke Esperanto ne estu por ŝi fremda. Samideane, Mikaelo Povorin.

Ni havas la plezuron anonci al vi la naskiĝon, la 18-an de junio, de nia nepo **Rafael**, denaska esperantisto, filo de Karine Ducloyer kaj Eduardo Trapani en Montevideo (Urugvajo) kaj frato de Elena, kies patra lingvo estas Esperanto. Josette kaj Jean-Pierre Ducloyer el Bretonio, Francio



## Por ke infano estu denaska...

ne sufiĉas nomi ĝin tia...

Kun jam tri infanoj, ni ofte alfrontis en Esperantujo la klasikajn demandojn: *Ĉu ili estas denaskaj? Ĉu vi parolas/instruas al ili Esperanton?* Kaj, same pri la filino Klára (12-jara) kiel pri la filoj Ruben (baldaŭ 10-jara) kaj Dorián (4-jara), ni ĉiam devis respondi per neo.



*Dorián, Klára kaj Ruben*

Dume, en aliaj medioj, ni akiris grandan sperton ankaŭ en respondado al la demandoj: *Kial ili ne parolas hungare? Kial ili vizitas nederlandlingvan lernejon?* kaj, malofte: *Ĉu tiom da lingvoj ne estas tro?*

### Kvarlingvaj infanoj

Resumu ni la familian vivhistorion. Nia opo (la eka kerno: Fabienne, franca; István, hungara) loĝis inter 1992 kaj 2002 en Roterdamo, de 2002 ĝis 2004 en Bruselo, kaj ekde tiam en Luksemburgio. Klára kaj Ruben fariĝis kvarlingvaj, kun diversgrada scipovo. La nederlandan (strata, lerneja lingvo) ili aŭdis, ekde la aĝo de tri monatoj, preskaŭ ĉiutage de Ada, ege talenta kaj infan-ama virino, kiu dumtage zorgis pri ili, kaj, kompreneble, de grupeto samaĝula. La francan parolis al ili la patrino, la hungaran "liveris" la patro. Ili kutimis reagi, plej ofte, en la lingvo en kiu ili estis alparolataj. Esperanto dume "pasis super ilia kapo", ĉar ĝi funkciadis kiel la kutima lingvo inter la gepatroj. Ni ne nepre planis, sed supozis ke tio sufiĉos por ke ili ĝin iugrade regu – kaj se ne estus tiel, ĉu gravus? Ni scias ĉiuj ke

Esperanto estas la plej facila lingvo: do, ili povus lerni ĝin ĉiam ajn...

Kaj montriĝis ke Esperanto efektive "prizorgis sin mem": la unua signo estis kiam Klára, 2-jara, postulis de gastino en Esperanto: *Kantu!* Pasis ĉe ni ja sufiĉe da Esperolantoj – ĉu kolegoj el la Centra Oficejo ĉu gastoj per Pasporta Servo – por ke ne nur la gepatroj servu kiel verda lingva modelo. En 2001 Klára, en 2006 Ruben kaj Klára partoprenis la Internacian Infanan Kongreseton sen apartaj lingvaj problemoj – ni ŝatas memori ke Klára 6-jara eĉ iom interpretis por franca amiko.

Interesa ŝanĝo en la lingva reĝimo okazis por ambaŭ infanoj, kiam ili siavice ekvizitis lernejon: preskaŭ de unu tago al alia, ili ŝanĝis sian kutimon respondadi hungare al la patro kaj uzi la francan en la intergefrata rolo: la nederlanda detronigis ambaŭ. Sed paĉjo persistis paroli hungare, ne tro zorgante pri la foje (fakte, tute ne ofte) mirantaj rigardoj de eksteruloj. Poste, en Bruselo, kvankam la lerneja lingvo restis laŭ nia elekto la nederlanda, Klára kaj Ruben ekuzis la superregan lingvon de tiu urbo, la francan, por paroli inter si kaj al ambaŭ gepatroj.

Tiel okazis ke nia filo Dorián naskiĝis en 2003 en lingve iom malpli varian medion Bruselan. En sia unua vivojaro li aŭdis preskaŭ nur la francan, ĉar la gefratoj, malgraŭ sia komenca ideo, parolis al li nur france anstataŭ nederlande, kaj ĉar la hungara kaj Esperanto sursceniĝis nur en la semajnfinoj, kiam hejmis la patro, intertempe eklaborinta en Luksemburgio.



*István kun la du knaboj*

Dorián uzas aktive preskaŭ nur la francan, sed taŭge komprenas kaj en Hungario parolas la hungaran; pri lia kompreno de (daŭre aŭdata) Esperanto kaj (ofte televidata) germana ni havas de tempo al tempo amuzajn indikojn.

### Multlingva lernejo

Je nia alveno al Luksemburgio, Ruben kaj Klára ekrajtis frekventi t.n. Eŭropan Lernejon (EL), kies statuta celo estas havigi al infanoj de, unuavice, funkciuloj de EU, instruadon tian ke ili laŭbezzone povu daŭrigi siajn studojn en sia hejmlando. Jen la interpreto kiun EL donas al “patrina lingvo”. Tamen, multas ĉi tie idoj de malsamlingvaj gepatroj: ili kutime elektas la sekcion de la lingvo pli “granda”, aŭ de la lingvo efektive patrino. Ni faris malsame, petante aliĝon al la nederlandlingva sekcio, subtenante nian peton per dokumentoj el la ĝistiamaj lernejoj. Tion oni akceptis, sed montriĝis malpli facile akceptigi nian elekton pri la t.n. “dua lingvo”, t.e. la plej intense lernata fremda lingvo, kiu ekde la aĝo de 13 jaroj fariĝas parte ankaŭ lingvo de instruado. Ĝi devas esti la angla, franca aŭ la germana. Ni elektis la lastan, ĉar la francan Klára kaj Ruben jam scias, kaj ĉar la angla ĉiukaze alvenos kiel “tria lingvo”. Tia motivo tamen ŝajnis al EL stranga: “ni ne estas lingvolernejo!”, ili reagis. Necesis argumenti per la (tre et)parte germana origino de nia familio por venkigi tiun (ŝajn)identecan elekton, kaj silenti pri slovaka praavino...

Tri jarojn post la eklerno, nun ambaŭ niaj “granduloj” bone posedas la kvar kapablojn en la germana. Ili komprenas ankaŭ la lokan leceburgan lingvon, kiu funkcias ne tiom stratlingve (tiel rolas pli la franca) kiom en la organizita loka vivo, por ni precipe en la muziklernejo kaj en la futbalklubo. Dume Klára lernas ankaŭ la anglan de unu jaro, kaj mirigas nin kiom rapide la tuta klaso progresas, parte pro la ĉieco de la angla, parte pro la bona socia situacio de la gepatroj – kaj certe ankaŭ pro la talento de la instruistino. Klára povas apenaŭ kredi ke la angla al Fabienne estis instruata tra la franca kaj ne “Ĉe-metode”... sed ŝi defendas la patrinon per la argumento ke tiu ĉiukaze komencis sian unuan fremdan lingvon tro aĝa, 12-jara...

Pri Dorián ni povas elekti inter la hungara aŭ franca klaso en EL, luksemburga lernejo, aŭ eĉ franca lernejo. Lia kontakto

kun la nederlanda estas nula, ni do ne elektis la nederlandan malgraŭ nia forta ŝato de ties eduksistemo, vere brila kaj feliĉiga por niaj granduloj... ni pensis serioze pri la luksemburga: fine unu el ni fariĝus vera luksemburgano! sed 1°) en la loka lerneja sistemo, la leceburga grade cedas sian lokon al la germana kaj poste la franca, ĉu do tia lingva influo sufiĉus? 2°) ni aŭdis kritikojn pri la ĝenerala nivelo, kaj ŝajnis al ni tre aŭtoritata tradicia eduksistemo, tre malsama al la nederlanda 3°) la horaro de la lernejo absolute ne kuntaŭgis kun la laborreĝimo de Fabienne (“patrinoj prizorgu la infanojn”...).

Eblus elekti la hungaran, sed ni aŭdis malfavorajn komentojn pri la instruistino... Fakte, iuj hungaraj familioj preferas la luksemburgan sistemon (eble pro ĝiaj supozata aŭtoritateco kaj lingvo simila al la germana, kiun ili regas). Krome, la hungara sekcio translokiĝos al distanco de 40 minutoj, laŭ dubinda burokrata decido. Ni do malgaje elektis la francan: nia etulo estos nur dulingva! Ĉu li kapablos lerni facile la germanan? Ĉu li eltenos 32-kapan klason, kaj ĉu ni eltenos la francan etoson?



*Fabienne kun Dorián*

Fabienne ne tro sentas sin bone interstreĉitaj francoj, sed aliflanke pli facile partoprenos la lernejan vivon. Ni preskaŭ bedaŭras tiun ĉi lukson da elektoj, sed en tiu ĉi multlingva landeto la elekto de lernejo multajn hezitas kaj diskutigas: kiel kompromisi inter diversaj avantaĝoj?

Vi tiel povas diveni kiom amuzas nin la demando: *Ĉu vi ne parolas Esperante al viaj infanoj? Kial via filo krokodilas france/germane/nederlande anstataŭ paroli Esperante?* Ne, ni prefere fieras eduki niajn infanojn kun la interna ideo, plej gravas por ni havi grandan manĝotablon por la gastoj.

**Fabienne BERTHELOT kaj István ERTL**

## Steiner–lernejo por handikapitoj en Israelo

En Jerusalemo, estas lernejo kiu estas la sola de sia speco en la tuta areo. Ĝi estas antropozofia lernejo por infanoj kun severa handikapeco en la cerbo kaj korpa evoluado.

Estas kvar klasoj en nia lernejo. La plej junaj aĝas inter 7–10 jaroj, la mezaj inter 10 kaj 13, estas klaso kun studentoj de la grupo de iom pli junaj kaj plej aĝaj, kiu havas lecionon unufoje ĉiutage. Tio estas de la 13–14 jaraĝuloj, kaj la plej aĝaj estas inter 14 kaj 17. En nia lernejo, la infanoj studos ĝis ili aĝos 21 jarojn, kiel ĉiuj aliaj edukprogramoj por infanoj kun specialaj bezonoj.

### Antropozofia metodo

En la lernejo oni uzas metodon de doktoro Rudolf Steiner, nomite “la kuraca edukado”. Kiam temas pri niaj studentoj, ni sekvas jenan ideon: en ĉiu persono, ankaŭ kiam la korpo estas tre damaĝita, brilas ia pli alta konscio, origine de la pli spiritaj partoj kiuj estigas homon. Steiner priskribis tion en metaforo de fajro kiu brulas en olea lampo kun vitraj muroj. La vitra lampo estas la korpo kaj la fajro kio brulas ene estas la animo. Kiam la korpo havas handikapojn, estas kiel karba fumo kiu gluiĝis al la muroj de la lampo, ĝenante la lumon brili eksteren. Sed la fajro tamen brulas.

Tial ni kreas por niaj studentoj spacon kie ni klare, lerte, pacience, kun homa digno fidas ke ili kapablas kaj komprenas. En tiu spaco ni kuraĝigas ilin malkovri al si mem kaj iliaj ĉirkaŭuloj tion pri kio ili ja kapablas. Kaj ofte tiam okazas feliĉegaj surprizoj!

Laŭ antropozofia vidpunkto, kiam infano naskiĝas kun iaj misfunkcioj en la korpoj, tion povas kaŭzi inter alie la enkarniĝanta animo mem. Eble en pasintaj enkarniĝoj, malsanigaj kutimoj en la vivo fiksiĝis en la animo, tiel ke kiam ĝi denove devis sin esprimi en fizika korpo, la malsanaj animaj scioj ne sukcesis enkarniĝi harmonie en la fizika korpo. Tiam la tasko de la edukistoj estas atingi tiujn animajn fortojn kaj gvidi ilin al saniĝo. Krom provi helpi al la infano kun sia nuna vivo, la celo koncernas ankaŭ la venontajn enkarniĝojn, kiam espereble ili povu sane esprimiĝi en fizika korpo.

Laŭ antropozofia edukado, la unua instruado kiu estas la fundamento de ĉiu alia instruado, estas kiel kreskigi liberan homon. El tio, oni atentis koni procesojn de

la vivo. Ekzemple, la studentoj ne nur manĝas panon, sed ankaŭ mem preparas panon, kuketojn, kukojn. La klaso de la plej aĝaj preparas panon por la tuta lernejo dum la semajno. En la ĝardeno ili semis tritikon kaj kiam ĝi flavos, rikoltos la grenojn kaj el ĝi preparu farunon.



Unu plia grava principo de la kuraca edukado estas konservi la ritmon de la tagordo ekvilibra kaj ordigita. Ekvilibra tiel ke ĝi “spiru” vivodone, inter strebo de aktivecoj kaj taŭga ripozado. La ordo de ordinara tago en la lernejo estas baze ripetanta dum la tagoj. Tio celas sentebliĝi stabilecon. Ĉar kiam oni scias kio okazos kiam, oni iom sentas kontrolon pri la situacio. Tio gravas speciale kiam oni eble ne tre klare komprenas la ĉirkaŭecon kaj sin mem, kaj facile neatenditaj okazaĵoj povus sentiĝi kaosaj kaj eble eĉ minacantaj. Ni ja ekskursas al novaj lokoj kaj dum festoj kiam la tuta lernejo venas al unu klaso por kune festi estas certe eksterordinare. Sed ni ja havas konatan stabilan grundon sub la piedoj por desalti kaj kien reveni. Antropozofie, oni provas krei spacon agrablan por ĉeesti kaj kreskadi trankvile. La konataj trajtoj estas muroj farbitaj per helaj agrablaj koloroj en teksturo kiel de nubo, (provante) uzi nur naturajn materialojn por la meblaroj kaj ornamaĵoj kiel ligno kaj naturaj ŝtofoj, sen aparatoj kiel televido aŭ radio aŭ surbendigita muziko, kaj ankaŭ lumo de elektraj lampoj oni moligas per paperaj lampŝirmiloj. Ankaŭ la materialoj uzitaj ĉiutage por artoj aŭ



purigado estu naturaj. La nutrado estu natura kaj vegetara. En la lerneja ĝardeno kreskas spicoplantoj, legomoj, grenoj, floroj, kiujn la infanoj semis, kaj korte kreskas nove plantitaj arboj. Ornamaĵoj kutimas esti diversaj pupoj faritaj el felto aŭ lano kun simbolaj kaj delikataj trajtoj, pentraĵoj de delikataj formoj per akvokoloroj.

Verŝajne, la plej grava parto de kuraca ĉirkaŭeco estas la laboristoj kiuj edukas kaj gvidas la okazaĵojn. Konscii pri kiel ni plenigas tian spacon, per sonoj aŭ bruoj, niaj movoj, parolado, humoro, pensoj kaj propra ĉeesto kio kompreneble influas al niaj ĉirkaŭuloj.

## Edukado al memzorgado

La laboristoj estas kaj edukistoj kaj fleghelpistoj. Ni helpas al la infanoj preskaŭ pri ĉio. Kelkaj bezonas helpon por paŝi, ĉu pro fizikaj malfacilecoj, kaj aliaj ĉar ili bezonas helpon koncentriĝi kiam la veturigilo venigis ilin al la lernejo, ili bezonas nun enveni al la klason kaj ne resti ie surstrate. La infanoj lernas kiel sin vesti kaj malvesti, iri al la necesejo, fari la necesajojn en necesejo kaj ne en siaj vestaĵoj. Aldone, ni helpas al ili gimnastiki specialajn fizioterapiajn ekzercojn por ekvilibri iliajn senton de siaj propraj korpoj. Krome, ni helpas al ili koncentriĝi dum partoprenado en aktivecoj kiel lecionoj, kreadoaktivecoj, sidi manĝante dum la komunaj manĝoj, kaj manĝi – ĉu taŭge ĉu entute, kaj brosi la dentojn poste. Do la memzorgado estas eble la plej vasta fako studita kaj instruita en nia lernejo.

## Universala lingvo

Estas nur kelkaj studentoj kiuj parolas vortojn en ia nacia lingvo. Pro tio en la komencanta leciono, oni helpas al ili diri bonan matenon vorte, kaj en eŭritmio, kiu estas antropozofia movarto. Eŭritmio temas pri movo farita per la korpo kiu priskribas sonon alparolita. Krome, specialaj komunikuracistinoj venas por aparte praktiki lernadon de parolado kun la studentoj. Komunikaj eblas kaj vorte, kaj bilde. Tio estas por kompreni pensadon en abstrakta koncepto, sen bezoni la objekton. Tiel oni planas kaj parolas.

En la lernejo, ni lernas kiel uzi sufiĉe bazajn vortojn en la signolingvo. Ekzemple “mi” kaj “volas”. Per tiuj signoj eblas konstrui frazojn por aliaj bezonoj kiel “trinki”, “manĝi”, “necesumi”, “pli”, “bonvolu”.

Krome, ni parolas en la lernejo hebree, arabe, ruse, angle, iomete da esperanto kaj iomete da persa. Flue parolas en ia nacia lingvo nur la laboristoj. La diverseco de parolitaj lingvoj en la lernejo originas en tio ke estas internacia ĉeestado. Kun studentoj kies familioj devenas el Rusio, ni alparolas ankaŭ la rusan lingvon. Same al niaj arabaj studentoj oni ankaŭ alparolas la araban. Esperanto parolatas en la lernejo ĉar mi foje kantas al la infanoj infankantojn en Esperanto.

Mi laboras en la lernejo jam 3 jaroj. La plej multaj el miaj studentoj ne povas sin esprimi en ia parola lingvo. Kaj kiuj povas, tiuj apenaŭ faras tion. Sed ju pli da tempo mi vivas kun ili, des pli mi lernas koni ilin, kaj la lingvojn kiujn ili persone uzas. Tiuj estas lingvoj kiujn ni ĉiuj parolas. La lingvo esti sin mem. Temas pri la maniero en kio ĉiu el ni estas si mem.

Tio estas kaj universala kaj individua lingvo. Pro tio ke absolute ĉiu persono estas alia, ĉiu persono havas sian propran tian lingvon. Mi pensas ke ni povas kompreni ĝin se ni provas kompreni ke la alia persono havas alian lingvon, kaj gravas aŭskulti lian/ŝian sinesprimadon, estu tiom malkutima kaj nekonata kiel ĝi estu, ĉar li/ŝi havas ion por diri. Kaj tiam malkovriĝas la universaleco: kie troviĝas volo, tie troviĝas ponto.

La lernejo estas agrabla kaj interesa familia loko. ĝi nomiĝas *HaDvir HaĤadaŝ*. Dvir estas la plej sankta loko en la antikva templo en Jerusalemo. *Ĥadaŝ* signifas nova. Kaj tio jam temas pri kiel estiĝis la lernejo: el klaso de speciala edukado kadre de ordinara lernejo, nomite klaso Dvir.

**Tali WANDEL**

### Rimarko de la redaktoro

Tiu ĉi artikolo estas iom ekstertema rilate al *Familia Esperanto*, sed post iom da hezito mi decidis aperigi ĝin pro pluraj kialoj, inter alie ĉar la aŭtorino mem estas denaskulino. Pri opinioj esprimataj ĉi tie respondecas nek la redaktoro de FE, nek Rondo Familia de UEA.

# Kiu havas la ?

*Kaj kiu trinkas plej volonte akvon?*

*Tiuj estas la du demandoj, al kiuj vi devas trovi la respondon laŭ la 14 subaj asertoj.*

- 1) La anglo loĝas en la ruĝa domo.
- 2) La hispano hundon havas.
- 3) En la verda domo oni trinkas kafon.
- 4) La rusoj teon trinkas.
- 5) La verda domo staras maldekstre de la blanka (rigardate de ni).
- 6) La persono kiu legas *MONATO*-n havas abelojn.
- 7) En la flava domo oni legas *ESPERANTO*-n.
- 8) En la meza domo oni trinkas lakton.
- 9) La norvego loĝas en la unua domo.
- 10) En la domo apud la kato oni legas *KONTAKTO*-n.
- 11) En la domo apud la ĉevalo oni legas *ESPERANTO*-n.
- 12) La leganto de *IPR* trinkas pomsukon.
- 13) La japano legas revuon "*EL POPOLA ĈINIO*".
- 14) La norvego loĝas apud la blua domo.



1	2	3	4	5	
					Revuo
					Nacieco
					Dombesto
					Trinkaĵo
					Koloro

*Kun permeso de la aŭtorino, **Katalin Kováts**, redaktantino de <http://edukado.net> solvon de enigmo vi povas peti de [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net)*